

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
tipografia edizioni **SAVIOLO** s.n.c. - Vercelli

Anno 91 - n. 5
SETTEMBRE-OTTOBRE 2012



65-a IKUE-KONGRESO

Pécs (Hungario) de la 14a ĝis la 21a de Julio



De la 14a ĝis la 21a de Julio okazis en Pécs la ĉi-jara 65a IKUE-kongreso. El sesdek sep aliĝintoj partoprenis preskaŭ sesdeko da kongresanoj, alvenintaj de Germanio, Francio, Pollando, Hungario, Ĉeĥio, Slovakio, Kroatio kaj Italio.

La kongresa temo estis: "Mi kredas je unu Dio". Ĝi estis elektita antaŭvide de la "Jaro de la Kredo", proklamita de Papo Benedikto okaze de la 50-a datreveno de la malfermo de la Dua Vatikana Konkilio.

Pécs estas la kvina plej granda urbo en Hungario. Ĝi plutenas multajn memoraĵojn de sia pasinteco: arkeologiajn restaĵojn de la romia periodo, palacojn, preĝejojn, grandajn placojn kun ornamitaj fontanoj, monumentojn, statuojn. Ĉio atestas riĉan kulturen harmonion, ŝuldeblan al alternado de malsamaj etnoj: hungara, kroata, ŝvaba. En la urbo, jam de longe kunvivas pace etnoj el malsamaj originoj kaj moroj. En 1998 UNESKO nomumis ĝin "Urbo por la Paco" pro ĝia

flegado de minoritataj kulturoj kaj la akcepto de forfuĝintoj el balkanaj militoj.

Frumatene, la 14an, nia grupo, ok italaj kongresanoj, kuniĝis en Verono por ekveturi kune al Hungario. Ni atingis Pécs vespere, iom malfrue por partopreni, je la 18a, en la Sankta Meso en Esperanto, tamen, post la vespermanĝo, ni povis ĉeesti, ĉe la Ŝtona Muzeo, la inaŭguran ceremonion. Post la

saluto de la nova IKUE-prezidanto Giovanni Daminelli, la episkopo de Pécs, monsinjoro György Udvardy, prelegis pri "Naturo de la kredo, kredo kiel donaco". Sekvis koncerto de la Ĉambro Ĥoro "Fenikso" kaj fina regalado per trikaĵoj kaj dolĉaĵoj.

Dimanĉon matene ni vizitis la prakristanan tombejon kaj la katedralan ŝtonmuzeon. Je la 11a, en kongreseja salono, Carlo



Dum la sankta Meso en Esperanto en la Katedralo de Pécs

Sarandrea prelegis pri “Porta Fidei”. Posttagmeze ni vizitis la Katedralon, karakterizita de siaj kvar sonorilturoj. Oni diras ke ĝi estis prakristana Baziliko; poste, iom post iom, ĝi fariĝis episkopa sidejo de Pécs dank'al hungara reĝo Sankta Stefano. Post la Meso, tie celebrita, ni vizitis la apudan episkopan palacon, en kies konferenca salono, geedzoj Rössler prelegis pri “Liszt Ferenc kaj la koncepto de la muzika unueco”. Post vespermanĝo, en la franciskana preĝejo, Stefan Lepping ludis por ni orgen-koncerton kun muzikoj de Bach, Boehm kaj Buxtehude.

London, frumatene, ni ekveturis por tuttaga ekskurso. Unue ni atingis la plej gravan hungaran marian pilgrimejon: Mariagyűd. Ĝi elstaras piede de monto kie, en la jaro 1006, iuj abatoj konstruis kapeleton, en kiun la lokaj kristanoj metis statuon de la Madono. Pro la invadoj, dum sia historio ĝi fariĝis moskeo fare de Turkoj, ortodoksa kaj protestanta preĝejo fare de Serboj kaj Hungaroj. Pro tio la statuo malaperis de tie kaj nun troviĝas en la franciskana preĝejo de Osijek. Sur la monto okazis multaj miraklaj resaniĝoj kaj la fideluloj alportis tien statuon de Doloranta Dipatrino al kiu direktiĝas Krucvojo, kiun ni laŭiris. Poste ni veturis al Siklos, kie, post la tagmanĝo en urba restoracio, ni vizitis la tiean fortikaĵon. Survoje de la reveno ni haltis en Villany regiono konata pro vinproduktado, kie ni vizitis grandan subteran vinkelon.

Mardon matene okazis la ĝenerala kunsido de IKUE, ĉe kongreseja salono. En la sama

salono, posttagmeze, Carlo Sarandrea faris pri-komputilan lecionon. Poste, ĉe la apuda preĝejo, eksa moskeo, antaŭ la dimanĉa meso, geedzoj Rössler proponis muzikan horon, kun orgeno, fluto kaj komuna kantado. Fine ni vespermanĝis en la episkopa kelo, kie oni regalis nin per bongusta manĝaĵo kaj bonega vino laŭvole disdonita. Kompreneble tio instigis kantadojn kaj la vespero finiĝis en komuna gajeco.

La merkreda mateno estis tute dediĉita al la prelegoj. Komencis la hungara pastro Attila Szép pri “Sankta Maŭro episkopo kaj protektanto de la Pécs-Diocezo”. Sekvis Stefano Lepping pri “Unu Dio, unu Eklezio, multaj Kredo, unu homaro”. Tuj poste, Gottfried Noske komentis “Jesuo de Nazaret” la unua volumo de la libro de Papo Benedikto pri Jesuo. Sekve Miloslav Šváček revivigis al ni, per fotografiaĵoj, la pasintajn kongresojn de Parizo kaj Zagrebo. Posttagmeze ni traveturis la urbon per pitoreska trajneto dum gvidantino ĉiĉeronis al ni pri la historiaj palacoj kaj monumentoj. Nokte, ĉe la teatra placo, ni spektis folkloran krotatan dancadon, kiun ĉiuj ĉeestantoj rajtis partopreni.

Ĵaŭdon matene pludaŭris la prelegoj. Komencis profesoro Viktor Nyúl, kiu parolis pri “Kredo en la Sankta Skribo”. Sekvis Ágota Kirschné pri “Kredo kaj racio”. Fine Attila Szép prelegis pri “Paŭlanoj, la ununura hungara vira ordeno”. Posttagmeze ni veturis por eksterurba ekskurso al Bátos-zék, kiu, pasintece, suferis invadojn de Keltoj, Romianoj, Sarmantoj, Hunoj, Avaroj kaj

Slavoj. Tie la Cistercianoj fondis abatejon. La loko fariĝis iom post iom grava, ekonomia centro de vin-produktado. Post la invadoj de Tataroj kaj Turkoj kiuj detruis ĉion, oni konstruis novan preĝejon sur la ruinoj de la abatejo, dediĉitan al Ĉielenpreno de Maria. Poste ni, atingis Szekszardon, kie ni ĉeestis Meson. En apuda eta parko ni malkovris tabulon honore al nia neforgesebla Johano Kirsch, hungara diakono, paroĥdirektoro, forpasinta la oasintan 22-an de majo. Post la vespermanĝo, ĉe Kolping-lernejo, ni vizitis la tombejon por preĝi kune kun la vidvino kaj la gefiloj, ĉe lia tombo.

Vendrede, en la salono de la episkopa palaco, sinsekvis la lastaj prelegoj. Kanoniko Balázs Garadnay, ĝenerala vikario, paroĥestro de katedralo parolis pri “La lumo de kredo konsumas la mallumon”. Geedzoj Rössler prezentis dokument-filmon: “Lumo fine de la mondo,” pri la vojo al Santiago de Compostela. Marija Belošević prezentis novajn eldonaĵojn kaj parolis pri la enketo “Jaro de la Kredo”. Posttagmeze ni partoprenis la Krucvojon sur la Kalvaria Monteto en Pécs kaj vizitis la apudan parkon “Esperanto” en kiu staras memorŝildoj de la plej gravaj hungaraj esperantistoj. Post la vespermanĝo okazis la kutima adiaŭa vespero, gajigita per trinkaĵoj, kuketoj kaj prezentado de popolaj kantadoj, fare de la naciaj grupoj Ĉeĥoj, Slovakoj, Germanoj, Francoj, Poloj.

Sabaton, frumatene, sinsekvis la forveturoj.

Norma Cescotti



79-a IEF-Kongreso

Mazara del Vallo - 18-25 Aŭgusto 2012



Ĉi-jare la kongreso de la Itala Esperanto Federacio estis vere internacia kaj grandioza. Aliĝis 340 personoj alvenintaj de la kvin kontinentoj. El ili nur 115 estis Italoj, la eksterlandanoj plej multenombraj estis la Poloj (34), poste estis la Francoj (24), la Rusoj (23), Ukrainoj (14), Belgoj kaj Germanoj (23), Hispanoj (20) kaj aliaj. Inter la aliĝintoj estis ankaŭ 14 UECI-anoj. Kompreneble, ne ĉiuj povis partopreni: ekzemple la 19 afrikaj aliĝintoj ne povis akiri la necesan vizon, pro tio ili ne venis.

Temo de la kongreso estis: “Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof”.

Nia kongresejo estis hotelo “Hopps”, ĉe la marbordo, bela, komforta, kun multenombraj ejoj kaj salonoj por nia kunvenoj, naĝejo kaj bona manĝaĵo.

La urbo jam de longe sin preparis akcepti kaj gastigi nin. En Torino dum la pasinta kongreso la urbestro de Mazara

Nicolò Cristaldi, prezentis sian urbon kaj invitis nin; en Januaro oni estigis “Centro-n pri Esperanto kaj interkulturo” por kunordigi la eventon; pli ol 500 lernantoj el sep mazaraj lernejoj sekvis esperanto-kursojn, kiuj daŭros la venontan jaron; dum nia kongreso, en la urbocentro videblis multenombraj afiŝoj kun la programo de niaj enurbaj prezentaĵoj, kaj tolistrioj tra la stratoj anoncis nian ĉeeston.

Sabaton, je la 19-a, en la katedralo, la paroĥestro, pastro Orazio Placenti, celebris meson en Esperanto multenombre partoprenitan, kaj vespere post la vespermanĝo Jomo muzikis en la ĉefa placo ĝis noktomezo kun granda publika partopreno.

Dimanĉon je la 10-a en la salono de la komunuma konsilio okazis la solena malfermo de la kongreso je la ĉeesto de la urbestro, kiu substrekiis la pluretnan vokiĝon de Mazara, urbo en kiu oni parolas pli ol

kvardek malsamajn lingvojn. Antaŭ la urbestro longe parolis pri interkulturo Khaled Fouad Allam, profesoro pri sociologio de la muzulmana mondo kaj historio de la islamaj landoj ĉe la Universitato de Triesto kaj konsilanto pri la mediteraneaj politikoj ĉe la komunumo de Mazara. La festoparoladon plenumis Barbara Pietrzak, ĝenerala sekretario de UEA. Sekvis la kutimaj salutoj fare de la reprezentantoj de la diversaj landoj kaj fakaj asocioj. Fine oni anoncis la venontan kongreson okazontan en Kastelaro (apud Sanremo). Post la legado de la salutoj senditaj de la urbestro de Kastelaro, oni finis per la kantado de himno “La Espero”.

Posttagmeze okazis la deviga Jar-sembleo de IEF kun la kutimaj debatoj. Vespere sur la ĉefa placo okazis koncerto de la esperantista duopo “Kajto” ankaŭ ĉifoje kun bona partoprenado de publiko.

Dum la tuta semajno sinsekvigis intensa aktivado kun prelegoj, kursoj pri la lingvo, koncertoj, teatraĵoj, kunvenoj. Aparte riĉa estis elekteleco de la ekskursoj en la tuta okcidenta Sicilio. Aparte kurioza estis la vizito al lurb Mazara kaj ĝia kasbo ĉar gvidata de la urbestro mem. La partoprenantoj en unu el la biciklaj ekskursoj havis je sia dispono la biciklon dum la tuta semajno.

Sabaton matene okazis la oficiala fermo sed jam multaj devis foriri antaŭe.

Giovanni Daminelli



Post la Meso, antaŭ la katedralo de Mazara, kun la paroĥestro

SCIIGOJ EL AFRIKO

*Rubrica rivolta alle notizie dal mondo esperantista africano.
Rubriko celanta doni sciigojn el Afrika Esperantujo.*

CELEBRO DE LA 125-a DATREVENO DE ESPERANTO 19an de Julio 2012 en Kinŝaso (D.R. de Kongo)



El Afriko, Demokrata Respubliko de Kongo, alvenis ĉi tiu raporto:

Karaj gesamideanoj,

La 19-an de Julio 2012 en Kinŝaso okazis la 2-a Esperanta Kultura Tago, mallongige «EKT». Ni kaptis la okazon por sciigi al la partoprenintoj, ke Esperanto estas 125-jara ekde la monato de Julio 1912. Tiukaze, estis dirite, ke la iniciatinto de Esperanto, L. L. Zamenhof, publikigis, la 26-an de Julio 1887 en Varsovio, sian unuan libron pri Esperanto titolitan «Lingvo Internacia».

Li intencis faciligi la komunikadon, tiel li fondis lingvon, kiu estas sendependa kaj senlandlima, sufiĉe kapabla krei pli bonajn rilatojn inter homoj el diversaj originoj. Resume, mallonga historio de Esperanto estis legata antaŭ la partoprenantoj.

Por la gelernantoj de Espe-

ranto, tio estis okazo publike praktiki la lingvon kaj renkontiĝi kun aliaj Esperantistoj el Kinŝaso kaj el Bas-Kongo.

La tago estis ornamita je diversaj aktivadoj precipe:

- Ekspozicio de kelkaj dokumentoj pri Esperanto, kiujn ni disponas

- Diversludoj
- Danco
- Recitalo
- Scenetoj
- Konkursludoj:
 - literumado
 - demando-respondo (ĝenerala kulturo)

- traduko de francaj frazoj en Esperanto.

Kaj la ludintoj ricevis klasikajn objektojn kiel premion.

Ni estis tute feliĉaj pri la tago, kiu perfekte elmontris la celon mem de la klubo: «zorgadi pri la disvastigo de la neŭtrala lingvo por la antaŭenigo de la movado».

Ni tutkore dankas al s-ro Horst Gruner, kiu subtenis la manifestacion per signifa kontribuo.

Ni deziras interŝanĝi agadspertojn por la plibonigo de nia agadmaniero.

Plej samideane,

*Alexandrine Omba
kaj Rachel Mafuluko,
la organizintoj.*



Alexandrine Omba kaj Rachel Mafuluko



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

Raggio di cielo sulla terra

Ogni tanto qualcuno inneggia al paradiso, declamandolo come il miglior luogo possibile. Nello stesso momento si sentono espressioni di questo tipo: «Desidero andare in paradiso con tutto il cuore, ma non subito». Istintivamente preferiamo vivere ben radicati sulla terra, accettando tutto, anche le disgrazie, piuttosto che “vaneggiare” nel virtuale. La concretezza della vita di ogni giorno, con i suoi lati positivi e negativi, sta al vertice di ogni nostro desiderio. Nessuna eccezione.

Ogni giorno veramente rischiamo di fermarci a declamare, invece, la prigione nella quale, per colpa o meno, siamo stati condannati. E così mettiamo volentieri in un angolo remoto la nostalgia del paradiso: in altre parole di tutto quello che dentro di noi risuona come impegno, desiderio e volontà, tre cose sempre valide sia in cielo sia sulla terra. L'impegno è quello di santificare il nome di Dio, il desiderio è quello della regalità di Dio su tutti, la volontà è quella di voler ciò che Dio desidera per noi e per il mondo. Per questo, nella preghiera del «Padre nostro», ogni giorno ripetiamo con forza: «come in cielo così in terra».

Lo ripetiamo con consapevolezza, perché sappiamo che non si può vivere bene sulla terra senza un punto di orientamento e senza un motivo esistenziale. Sarebbe come navigare in mare aperto senza osservare le stelle; sarebbe come camminare di notte o girovagare in luoghi sconosciuti senza motivo, senza alcuna indicazione.

Radio de ĉielo sur la tero

De temp' al tempo iu laŭdegas la paradizon, deklamante ĝin kiel eble la plej belan lokon. En la sama momento oni aŭdas ĉi tiajn esprimojn: «Mi deziras iri en paradizon tutkore, sed ne tuj». Instinkte ni preferas travivi nian vivon ja enradikiĝintaj sur la tero, ĉion akceptante, eĉ la malfeliĉojn, ol “sopiri” al la virtualaĵoj. La konkretco de la ĉiutaga vivo, kun siaj pozitivaj kaj negativaj flankoj, senescepte restas ĉe la kulmino de ĉiu nia deziro.

Ĉiutage ni vere riskos halti por deklami, prefere, la karceron al kiu ni, kulpaj aŭ ne, estis kondamnitaj. Kaj tiel ni volonte metas en foran angulon la nostalgion pri la paradizo: alivorte, pri ĉio, kio interne de ni resonas kiel sindevigo, deziro kaj volo, tri aferoj ĉiam efikaj, ĉu en la ĉielo, ĉu sur la tero. La sindevigo estas sanktigi la nomon de Dio, la deziro estas la reĝeco de Dio sur ĉiuj, la volo estas voli tion, kion Dio deziras por ni kaj por la mondo. Por ĉi tio, en la preĝo «Padro nia», ĉiutage ni forte ripetis: «kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero».

Konscie ni ripetis tion, ĉar ni scias ke ni ne povas bone vivi sur la tero ne havante orientan punkton nek ekzistokialon. Tiamaniere estus kvazaŭ ni boatas en alta maro ne observante la stelojn; kvazaŭ ni nokte marŝus aŭ vagadus tra nekonataj lokoj senkaŭze, sen ia ajn indiko.

Succede anche a noi di vivere come un viandante che cammina senza meta, di fare mille cose senza sapere il perché, di stressarci ogni giorno per non fermarci a pensare e a riflettere. Ma come credenti siamo chiamati a vivere da scrupolosi pellegrini qui sulla terra, consapevoli di non essere nel luogo definitivo, ma di camminare su una strada che ci è stata offerta quale via al cielo. La preghiera del «Padre nostro», infatti, racchiude le tre grandi richieste della prima parte nell'espressione: «*come in cielo così in terra*». Noi crediamo che gli eventi spirituali, che si producono quaggiù, nel tempo, sia quelli positivi come quelli negativi, sia quelli personali come quelli delle persone che amiamo, sono un raggio di cielo e hanno un rapporto con l'altro mondo. Per cui chiediamo nella preghiera che quanto già si realizza in cielo in modo perenne lo si ricalchi anche sulla terra, almeno come desiderio, apprendimento ed esercitazione.

Pensiamo alla celebrazione del Natale: il cielo si apre sulla terra, una luce scende a fugare le tenebre. Chi sulla terra non è rassegnato al destino cieco, costui se ne può accorgere e correre a vedere «questo prodigio». Può anche udire un canto speciale: «*Gloria a Dio nel più alto dei cieli e sulla terra pace agli uomini, che egli ama*».

Guardare in alto, osservare la stella, ascoltare le voci del cielo può diventare tutto il nostro desiderio di vita, seminato in noi da una mano divina, affinché possiamo tratteggiare un cammino terreno alla luce delle «*cose invisibili che sono eterne*» (2Cor, 18b), e anticipare così il paradiso.

Okazas ankaŭ, ke ni vivas kiel vojiranto, kiu paŝas sencele, plenumante mil aferojn ne sciante la kialon; ni streĉiĝas, ĉiutage, ne haltante por pensi kaj prikonsideri. Sed kiel kredantoj ni estas alvokataj vivi kiel skrupulaj pilgrimantoj ĉi tie sur la tero, konsciaj ke ni ne estas en la definitiva loko, sed ke ni marŝas sur vojo, al ni oferdonita por atingi la ĉielon. La preĝo «*Patro nia*», fakte, entenas la tri grandajn petojn de la unua parto en la esprimon: «*kiel en la ĉielo, tiel sur la tero*». Ni kredas ke la spiritaj eventoj, efektiviĝantaj ĉi-sube, dum la tempo, ĉu tiuj pozitivaj, kiel tiuj negativaj, ĉu tiuj personaj, kiel tiuj de la personoj de ni amataj, estas radio de ĉielo kaj rilatas kun la alia mondo. Sekve ni petas per la preĝo, ke tio, kio jam efektiviĝas ĉiamdaŭre en la ĉielo, estu reproduktebla ankaŭ sur la tero, almenaŭ kiel deziro, lernado kaj ekzercado.

Ni konsideru la celebradon de Kristnasko: la ĉielo malfermiĝas al la tero, lumo subiras por forpeli la mallumojn. Tiu, kiu surtere ne rezignacias je la blinda sorto, povas ekrimarki tion kaj rapidi por vidi «*tiun mirindaĵon*». Li povos ankaŭ aŭdi apartan kanton: «*Gloron al Dio en la altoj kaj sur la tero pacon al la homoj de Lia bonvolo*».

Rigardi alten, observi la stelon, aŭskulti la ĉielajn voĉojn povos fariĝi la tuta nia viv-deziro, semita en nin de Dia mano, por ke ni povu skizi teran vojiron al la lumo de «*la nevidataĵoj kiuj estas eternaj*» (2Kor. 4,18b), kaj, tiamaniere, antaŭigi la paradizon.

Nota: la rubrica «*Dirite inter ni*» nel n-ro 4 di Katolika Sento, per un errore di impaginazione è comparsa a pagina 6 anziché 7. Ce ne scusiamo con i lettori. Se ci verrà richiesto inseriremo lo stesso dialogo in un prossimo numero.

Dirite inter ni ...



Konversacioj zorge de † Glaucio Corrado

017

ĈE LA BARBIRO

- Bonan tagon.
- Bonan tagon, sinjoro.
- Mi vidas, ke vi havas multajn klientojn.
- Ne, ili ne estas multaj.
- Kiom longe mi devos atendi?
- Ne tro longe: post kelkaj minutoj venos mia kolego kaj ni servos vin rapide.
- Ĉu vi havas kolegon?
- Jes, nun mi havas kolegon, ĉar mi volas pligrandigi mian klientaron.
- Ĉu via kolego estas tiel lerta kiel vi?
- Li estas juna, sed tre lerta.

DAL BARBIERE

- Buon giorno.
- Buon giorno, signore.
- Vedo che ha molti clienti.
- No, non sono molti.
- Quanto devo aspettare?
- Non troppo: fra qualche minuto arriva il mio collega e la serviremo rapidamente.
- Ha un collega?
- Sì, adesso ho un collega perché voglio aumentare la mia clientela
- Il suo collega è bravo come lei?
- È giovane, ma molto capace.



- Tamen, mi preferus, se vi tondus miajn harojn.
- Se vi tion deziras, tion mi faros.
- Via kolego povas prepari miajn harojn.
- Jes, kompreneble, li ilin antaŭlavos por la tondo.
- Akordite.
- Ĉu vi ĉiam preferas mallongajn harojn?
- Jes, mi ne ŝatas, ke ili ĝenu min.
- Preferirei, tuttavia che mi tagliasse lei i capelli.
- Se lo desidera lo farò.
- Il suo collega può preparare i miei capelli.
- Sì, naturalmente, li laverà prima per il taglio.
- D'accordo.
- Preferisce sempre i capelli corti?
- Sì, non mi piace che mi diano fastidio.

- Multaj homoj ŝatas longajn harojn.
- Por mi la mallongaj estas pli komfortaj.
- Tio estas vera, sed la modo...
- Pri la modo, mi tute ne interesiĝas.
- Nu, vi estas sportemulo. Vi volas, ke viaj haroj estu en ordo, sed vi ne ŝatas zorgi tro multe pri ili.
- Vi trafis perfekte: mi deziras, ke miaj haroj estu en ordo, ke ili estus puraj, sed mi ne volas malŝpari tempon kaj zorgi tro multe pri ili.
- Cetere vi havas fortikajn kaj sufiĉe multenombrajn harojn.
- Jes, povas esti, ke ili estas tiaj pro mia konduto al ili.
- Ha, jen mia helpanto!
- De kiu mi devas komenci?
- Nu, vidu, unue vi tondu la harojn al tiu junulo, poste zorgu pri la barbo de la sinjoro kaj fine bonvolu lavi la harojn al ĉi tiu alia sinjoro.
- Ĉu mi nur lavu al li la harojn?
- Jes.
- Kaj pri la tondo?
- Li estas malnova kliento kaj li al kutimiĝis al mia tondmaniero.
- En ordo.
- Ĉu vi aĉetis la sportan gazeton?
- Jes, mi havas ĝin en la sako.
- Bone, metu ĝin je dispono de la klientaro.
- Certe, ankaŭ ĉar tio vigligas la konversacion.
- Jes, ni scias, ke sporto diskutigas.
- Ĉu vi ankoraŭ trejniĝas en kuro?
- Malmulte, kaj kiam mi povas, ĉar mi devas dediĉi multan tempon al mia kvarjara filo.
- Mi komprenas, la filoj postulas la atenton de la gepatroj.
- Sed, kiam mi havas la okazon, mi ludas
- Molti uomini amano i capelli lunghi.
- Per me, corti sono più confortevoli.
- Questo è vero, ma la moda ...
- Della moda non mi interessa affatto.
- Beh, lei è uno sportivo. Lei vuole ohe i suoi capelli siano in ordine, ma non le piace curarsene troppo.
- Ha colto perfettamente nel segno: desidero che i miei capelli siano in ordine, che siano puliti, ma non voglio perdere tempo e curarmi troppo di loro.
- D'altro canto ha capelli robusti ed abbastanza folti.
- Sì, forse sono tali per il mio modo di trattarli.
- Oh, ecco il mio aiutante!
- Da chi devo iniziare?
- Ecco, guarda, per prima cosa taglia i capelli a quel giovane, poi datti da fare con la barba del signore ed infine lava, per piacere, i capelli a quest'altro signore.
- Devo solamente lavargli i capelli?
- Sì.
- E per il taglio?
- È un vecchio cliente e si è abituato al mio modo di lavorare.
- Bene.
- Hai comperato il giornale sportivo?
- Sì, ce l'ho nella borsa.
- Bene, mettilo a disposizione della clientela.
- Certo, anche perché questo rende vivace la conversazione.
- Sì, sappiamo che lo sport fa discutere.
- Si allena ancora nella corsa?
- Poco, e quando posso, perché devo dedicare molto tempo a mio figlio di quattro anni.
- Capisco, i figli richiedono l'attenzione dei genitori.
- Ma quando ho l'occasione, gioco la partita

-
- | | |
|--|--|
| futbalmatĉon kun miaj amikoj. | di calcio con i miei amici. |
| - Kaj la filo? | - Ed il figlio? |
| - Li fariĝas spektanto, kun mia edzino. | - Diventa spettatore, con mia moglie. |
| - Ĉu via edzino ne protestas? | - Sua moglie non protesta? |
| - Ne, mia edzino neniam protestas. | - No, mia moglie non protesta mai. |
| - Vi estas bonŝanculo. | - È' fortunato. |
| - Ha, jes, mi estis vere bonŝanca trovi mian dolĉan francinon. | - Ah, sì, sono stato veramente fortunato a trovare la mia dolce francese. |
| - Ĉu via edzino estas franca? | - Sua moglie è francese? |
| - Jes, mia edzino estas franca. | - Sì, mia moglie è francese. |
| - Sed vi ne estas franco. | - Ma lei non è francese. |
| - Mi estas italo. | - Sono italiano. |
| - Ĉu vi lernis la francan lingvon? | - Ha imparato la lingua francese? |
| - Certe, ke mi lernis ĝin. Mi profitis la fakton, ke mia edzino estas franca por lerni la lingvon. | - Certo che l'ho imparata. Ho approfittato del fatto che mia moglie è francese per imparare la lingua. |
| - Kaj vi bone faris. | - Ed ha fatto bene. |
| - Kaj nun mi volus, ke ankaŭ la filo lernu la francan. | - Ed ora vorrei che anche il figlio imparasse il francese. |
| - Tio ne devus esti malfacila kun via edzino. | - Questo non dovrebbe essere difficile con sua moglie. |
| - Mi esperas, ke ŝi havu la volon instrui al la infano. | - Spero che abbia la voglia di insegnare al bambino. |
| - Sed tio estas simpla: ŝi devas nur paroli france al la infano. | - Ma questo è semplice: deve solamente parlare in francese al bambino. |
| - Vi diras, ke tio estas simpla, sed mi ne estas je la sama opinio. | - Dice che questo è semplice, ma io non sono della stessa opinione. |
| - Kial? | - Perché? |
| - Ĉar ŝi vivas en Italio, kaj ŝi parolas kun ĉiuj la italan. | - Perché vive in Italia e parla italiano con tutti. |
| - Nu, estos utile ankaŭ al ŝi paroli france kun la filo. | - Ebbene, sarà utile anche per lei parlare in francese con il figlio. |
| - Kaj se la filo rifuzus paroli france? | - E se il figlio si rifiutasse di parlare in francese? |
| - Tio dependas de la maniero lernigi la lingvon al li. | - Ciò dipende dalla maniera di fargli imparare la lingua. |
| - Certe ne temos pri lecionoj kiel en la lernejo. | - Certamente non si tratterà di lezioni come a scuola. |
| - Tion forgesu. | - Questo lo dimentichi. |
| - Vi diris, ke vi opinias, ke la filo povos facile lerni de la patrino. | - Ha detto che pensa che il figlio potrà imparare facilmente dalla madre. |

-
- Certe.
 - Kaj kiel vi farus?
 - Vi diris, ke via edzino estas dolĉa.
 - Jes.
 - Nu, se ŝi estas dolĉa kun vi, ŝi estas dolĉa ankaŭ kun la infano.
 - Estas vere.
 - Ŝi estu do dolĉa, kiam ŝi parolas al li france.
 - Kaj kion ŝi devas diri al li?
 - Ĉion.
 - Ĉion?
 - Ĉion, kompreneble, ĉefe kiam la infano volas ludi.
 - Ĉu kiam la infano volas ludi?
 - Jes, ja. Kiam infano volas ludi, li malfacile zorgas pri aliaj aferoj.
 - Nu, ĉu vi diras, ke se li ludas li ne zorgas pri la malfacilaĵoj de la lingvo?
 - Tiel estas.
 - Bone.
 - Kaj memoru ankaŭ doni al la infano aliajn okazojn.
 - Ekzemple?
 - Nu, se vi havas amikojn, kiuj parolas la francan, ekspluatu ilin.
 - Ha, mi komprenas.
 - Kaj se venas parencoj el Francujo ankaŭ je tio profitu.
 - Ĉu, mi spektigu al li ankaŭ la televidon en la franca?
 - Sed atentu pri la programoj.
 - Ĉu mi elektu apartajn programojn?
 - Ĉefe je la komenco.
 - Kiajn programojn?
 - Tiujn por la infanoj, komencante de la kartunoj.
 - Kaj aliajn?
 - Jes, ankaŭ kiam oni prezentas ludojn por infanoj.
 - Certamente.
 - E come farebbe?
 - Ha detto che sua moglie è dolce.
 - Sì.
 - Ebbene, se è dolce con lei, lo è anche con il bambino.
 - È vero.
 - Sia dunque dolce quando gli parla in francese.
 - E cosa deve dirgli?
 - Tutto.
 - Tutto?
 - Tutto, naturalmente, specialmente quando il bambino vuole giocare.
 - Quando il bambino vuole giocare?
 - Sì, proprio. Quando un bambino vuol giocare difficilmente si interessa di altre cose.
 - Ebbene, lei dice che se lui gioca non si interessa delle difficoltà della lingua?
 - È così.
 - Bene.
 - E si ricordi anche di dare altre occasioni al bambino.
 - Per esempio?
 - Ecco, se avete degli amici che parlano il francese, sfruttateli.
 - Ah, capisco
 - E se vengono dei parenti dalla Francia approfitti anche di questo.
 - Gli devo anche far vedere la televisione in francese?
 - Ma attento ai programmi.
 - Devo scegliere dei programmi speciali?
 - Specialmente all'inizio.
 - Quali programmi?
 - Quelli per i bambini, cominciando dai cartoni animati.
 - Ed altri?
 - Sì, anche quando vengono presentati giochi per bambini.

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

TRAMONTO SUL SAHARA

SUNSUBIRO SUR SAHARON

*Momento di sosta della vita.
Trascendenze:
l'anima vagheggia l'eterno.*

*Momenta paŭzo de la vivo.
Transcendoj:
La animo sopiras la eternecon.*

*La mente evoca
dimensioni
di vite vissute in altre sfere.*

*La menso elvokas
dimensiojn
de travivitaj vivoj en aliaj sferoj.*

*Sensazioni indefinite,
nostalgie...*

*Nedifinitaj sensacioj,
nostalgioj...*

*Il silenzio ha colori dell'oro...
E canta,
sulle dune ondulate,
con la voce del vento.*

*La silento havas orkolorojn...
Kaj kantas,
sur la ondumitaj dunoj,
per voĉo de la vento.*

*Un'alta palma
rompe gli spazi.*

*Alta palmo
trarompas la spacojn.*

Anna Amorelli Gennaro

(esperantigis Norma Cescotti)

26-a UECI-kongreso

GANDHI: ETA, GRANDA HOMO

prelego de Norma Cescotti

La pensoj de Gandhi sin bazas sur tri fundamentaj punktoj:

La ne-perforto, celanta al "Pura amo" devigata de la Santaj tekstoj de Hinduismo, de Evangelio kaj Korano. Jen lia penso pri tio:

La ne-perforto ne estas limiĝi ami tiun, kiu nin amas, sed estas ami tiun, kiu nin malamas. Tio estas la plej malfacila afero el ĉiuj, sed per la Dia graco, ĝi iĝas eĉ facile plenumbla se vere ni nepre tion volas.

La religia toleremo: porpaca kaj respektoplena kunvivado inter la multaj etnaj grupoj kaj la diversaj religiaj konfesioj ĉeestantaj en Hindujo. Tiel li ĝin konsideras:

La preĝo ne estas postulo. Ĝi estas nostalgio de la animo. Ĝi estas la ĉiutaga agnosko de la propra malforteco. La homo kiu sin konfidis al Dio ĉesas timi la homon... Ne tute maltrankviliĝu pro vi mem, lasu ĉiun zorgon al Dio. Tiu-ĉi ordo aperas en ĉiuj religioj.

La memdecido de la popoloj: por ke la Hinduoj povu releviĝi de sia mizero kaŭzita de la ekspluatado de naturaj rimedoj fare de la britaj kolonianoj. Por obteni tion li proponas la pacon: **Se oni volas konduki veran militon, kontraŭ la milito ni ne devas batali, sed ni iros de amo al amo, de paco al paco ĝis kiam la mondo estos surŝutata de tiu amo kaj de tiu paco pri kiuj la tuta mondo malsatas.**

La mesaĝo de Gandhi

estas tre aktuala kaj tamen la historio estas senĉese makulita de militoj kaj perfortoj.

Gandhi: eta, granda homo, kiu, per siaj nuraj fortoj sukcesas venki la potencon britan imperion kaj realigi la revon pri sendependeco de sia lando, pruvante ke la forto de ĉiu unuopulo povas fariĝi forto de tuta popolo.

Konata precipe per la nomo "Mahatma", granda animo, li estas pioniro de la rezistado al la subpremo, per amase civila malobeo. Per sia agado li inspiris multegajn movadojn por la defendo de civilaj rajtoj, kaj famajn eminentulojn kiel Martin Luther King, Nelson Mandela, Aung San Suu Kyi, Nobel premiita por


la paco.

Gandhi naskiĝis en Portbandar (Hindio) en la jaro 1869. Lia familio apartenas al grupo tradicie dediĉanta al komerco. Fakte, la familia nomo, Gandhi, signifas "drogvendisto"

Dum la unuaj lernojaroj li estas mezkvalita lernanto, plivere timida kaj embarasita. Li daŭrigas la superan studadon en Rajkot, kie la patro estas ĉefministro de la loka Princolando. Apenaŭ dekdujara li edziĝas, per antaŭaranĝita geedziĝo, laŭ la hinduisma tradicio kaj la geedzoj havos kvar filojn. En posta tempo, plurfoje, Gandhi kondamnos la kruelan moron de la "infanaj geedziĝoj"

Je dek sep jaroj, post la morto de la patro, li ekveturas al Londono por daŭrigi la studadon ĉe la universitata fakultato pri juro. Tie, iom post iom, li konformiĝas al la angla vivmaniero, eĉ sin vestante laŭ tia modo. Post la sukceso ĉe juraj ekzamenoj, li revenas al Hindio, kie li ekscias, ke intertempe lia patrino mortis. Per la helpo de sia frato, advokato, li ekpraktikas la advokataĵon kaj, du jarojn poste, hinda firmo, komercanta en Natal, komisiis al li procesan defendon en Sudafriko. En tiu kontinento li tuj kontaktiĝas kun la rasa segregacio (apartaĵo) sed, precipe, kun la rasa antaŭjuĝo kaj la preskaŭ sklava situacio en kiu vivas liaj cent kvindek mil samlandanoj.

Tiuj kaj aliaj situacioj emigas lin al forta interna evoluo kaj li ekkonsideras la vivkondiĉojn de sia popolo kaj sian



rangon en tiu societo. Tial li fondas la "Natal Indian Congress", organizon kiu transformos la hindan komunumon en politikan homogenan forton.

Gvidanto de la Hindoj en Sudafriko, li fondas ĵurnalon "Indian opinion" kaj, kun granda intereso, legas la sanktajn librojn pri Hinduismo, kiuj lin konvinkas aktivigi profundajn ŝanĝojn.

Li aĉetas terpecon en Phoenix, apud Durban, kie estos presita la ĵurnalo kaj tien li enlokiĝas kun la familio kaj la kunlaborantoj. Li malfermas bienon, kie ĉiuj membroj de la komunumo, sendistinge pri rango aŭ haŭtkoloro, partoprenas en terkultura laboro kaj ricevas la saman salajron. La bieno de Phoenix fariĝas la unua modelo, en kiu oni aplikas propravolan malriĉecon, manlaboron kaj preĝadon.

En la jaro 1906 Gandhi votas sin al ĉasteco kaj, en tiu centro, li komencas la praktikadon de fasto, purigas la latrinojn, labora aktiveco rezervita en Hindio al la senkastaj (parioj) aŭ "netuŝbluloj" tiel nomataj ĉar al ili estas nepre malpermesite ekkontakti aliajn kastojn.

En la jaro 1915 Gandhi, sekve de grava pleŭrito, revenas al Hindio, kie oni trude ordonas al li "la politikan silenton". Dum ties tuta daŭro li trairas la landon, de vilaĝo al vilaĝo por ekkoni la vivkondiĉojn de hindoj kaj ilian animon.

Liaj unuaj sukcesoj realiĝas en la jaroj 1917/18, kiam li organizas la "civilan malobeon" de dekmiloj da senteraj kamparanoj, devigitaj kultivi la kampojn per indig-arboj anstataŭ tiujn produktantajn nutraĵrimedojn necesaj al ilia vivtenado. Gandhi arigas voluntulojn kaj, kun ili, ekpurigas vilaĝojn, konstruas lernejojn kaj malsanulejojn. Sekve de tio li estas arestata pro "malkvietigo de la publika ordo", sed centmiloj da manifestaciintoj

petas la revokon de la akuzo.

La loka aŭtoritato, kontraŭ tia problemo, nomas komisionon kiu sin deklaras favora al la kamparanoj. Partoprenas en tiu eĉ Gandhi kiun la popolo elektas "bapu", tio estas - patro - kaj lia famo plivastiĝas tra la tuta Hindio.

En la jaro 1919 la brita regado aprobas dokumenton per kiu oni plilongigas, eĉ dum la paco, la restriktadon de libereco validigitan dum la milito. Gandhi organizas imponan ĝeneralan strikon kun, samtempe, preĝado kaj fasto. Li estas tuj arestata, eksplodas tumultoj tra la tuta Hindio kun konsekvencaj rezprezalioj kiel la historia masakro de Amritsar, kiu kaŭzis centojn da civilaj murditoj kaj milojn da vunditoj, provokante la koleron de la tuta loĝantaro.

La saman jaron Gandhi eniras la partion "Nacia Hinda Kongreso", organizon kiu enhavas la plej elitajn, politike moderajn partojn de la societo. Dum mallonga tempo, li iĝas estro de la hinda kontraŭkolonia movado kaj, du jarojn poste, prezidanto de Partio de Kongreso. Sub lia gvido estas aprobatata nova konstitucio kaj la partio transformiĝas de klasisma al amasa organizo kun nacia reprezenta grupo.

Gandhi pliampleksigas sian ne-perfortan principon, strebante al la aŭtonomio kaj al la memsufiĉo de la lando, precipe al la interna produktado de la nepraj vivrimedoj por la loĝantaro. Por bojkoti la fremdajn produktojn, precipe la anglajn ŝtofojn, li invitas ĉiujn Hindojn, riĉajn kaj malriĉajn, surmeti khadi-veston, teksaĵon mane ŝpinita per rotacia bobenilo. Pro tiu aktiveco eĉ la virinoj rajtas partopreni en la movado por sendependeco. Gandhi mem ŝpinas ĉiutage kaj surmetas la blankan kamplaboristan veston, kiu fariĝas la uniformo de la Hinda Kongresa Partio. La

teksaĵo, aŭ khadi, estos simbolo de la hinda lukto por la sendependeco kaj la rotacia bobenilo estos enmetita en la flagon de la sendependa Hindio.

En la jaro 1930 Gandhi startigas kampanjon kontraŭ la saloimposto. Komenciĝas pro tio la fama marŝo de la salo je 380 kilometroj: defilado de marŝantoj, pliigita laŭlonge la vojo de miloj da sekvantoj kiuj, alveninte ĉe la bordoj de la hinda Oceano, ekstraktas salon malobservante la reĝan monopolon. La Kampanjo estas senkompatate subpremata kun la aresto de pli ol 60.000 hindoj, inkluzive de Gandhi kaj de multaj kongresanoj.

Kiam, la sekvantan jaron, li eliras el la malliberejo, la brita regado decidas intertrakti kun li, subskribante kune la "Pakton de Delhi" per kiu la Britoj sin devigas liberigi ĉiujn politikajn kaptitojn, rajtigi la ekstraktadon de salo kaj pravigi la bojkoton de anglaj teksaĵoj. Gandhi, siaflanke, sindevigas ĉesigi la movadon pri civila malobeo. Li estas invitata al Londono, okaze de ronda tablo, kie li restadas tri monatojn. Vizitante Eŭropon, li alvenas ankaŭ al Romo, kie li dezirus renkontiĝi kun la Papo Pio la 11-a, sed la peto estas rifuzata ĉar oni opinias ke li estas "persono nekongrue vestita". Tamen, vere, la kialo estas diplomatia: la Papo timas altiri sur sin la anglajn kritikojn, aŭ tiujn religiajn sekve de malkaŝa simpatio por la mahatmo, fare de protestantaj prelatoj.

Je la eksplodo de la dua mondmilito, Gandhi decidas ne subteni Briton ĝis kiam ne estas garantiita al lia lando tuja kaj plena sendependeco. La brita regado rezistas al tiuj premoj kaj aktiviĝas favore al dividiĝo inter hinduisma kaj islama fluoj, interne de la politika sendependa movado. Gandhi intensigas siajn porsendependajn postulojn invitante ĉiujn al

kompleta ne-perforta ekribelo pere de grandaj protestaj manifestacioj. La Britoj reagis per amasaj arestoj, senprecedencaj subpremoj kaj enkarcerigo de Gandhi kaj de la tuta kongresa estraro.

Dum la dujara kaptiteco lia edzino mortas pro kor-kolapso kaj li mem, iom poste estas liberigita ĉar li suferas pro malario.

En la jaro 1947, post la mondmilita fino, Britio rajtigas plenan sendependecon de Hindio, tamen nur post kiam ĝi ekkonscias, ke la islama ligo estigontas hindan islaman nacion, Pakistano, kiu celas politike disigi la du ĉefajn religiajn komunumojn. Fakte, iom poste, naskiĝas fortaj streĉiĝoj inter Pakistano kaj Hindio kaŭze de teritoria kontrolo.

La 13-an de Januaro 1948, Gandhi, jam sepdekjara, komencas sian lastan faston, kun la espero ke oni ĉesigu ĉiun perforton, kaj ke Pakistano kaj Hindio certigu la egalecon inter ĉiuj religioj. Deksep tagojn poste, en Nov-Delhio, dum Gandhi eniras en la ĝardenon por la kutima ekumena preĝado, li estas murdita per tri pistolpafoj de radikala

hindua fanatikulo, kiu taksas lin kulpata pri cedo al nova pakistana regado. La murdinto estas kaptita kaj ekzekutita malgraŭ la kontraŭstaro de subtenantoj de Gandhi.

Laŭ lia deziro, liaj cindroj estas disŝutitaj sur la ĉefajn mondriverojn: Nilon, Tamizon, Volgon, Gangon, laŭ kies bordoj, dum la funebro, amasiĝas du milionoj da Hindoj por omaĝi al li.

Gandhi travivis ekstreme simplan vivon, ĉiujn respektante, ek de la "netuŝebluloj" konstituantaj grandan parton de la loĝantaro. Malŝatataj de ĉiuj, ili vivis ĉe la rando de la socio sed, por Gandhi ili estis filoj de Hari, tio estas de Dio, laŭ la evangelia koncepto kiu vidas la lastajn surtere, la unuajn en la Dia regno. Li vivis preskaŭ kiel ermito, inklina al filozofia penso, laŭ kiu la animo estas la vera fonto de la homa forto. Sekve de sia disiĝo de la materialaj bezonoj, la homo estas gvidata laŭ la vojo de la vero, al Dio.

La penso de Gandhi estis, parte kondiĉita de la evangelia legado:

Mi estas nur humila serĉan-

to de vero, mi havas firman intencon trovi ĝin. Mi ne konsideras tro granda neniun sinoferon por vidi, vidalvide, Dion. Kaj li pensas ke la vojeto kondukanta al Dio estas interne de ĉiu homo. **Ju pli la homo konas sin mem, des pli li progresas.** Krome, sekvan la kristanan instruon "amu vian proksimulon kiel vin mem" li predikas fratan amikecon inter ĉiuj homoj estaĵoj, muzulmanoj kaj Hindoj, viroj kaj virinoj, parioj kaj bramanoj en la nomo de la amo kaj de la egaleco. **Mi kaj vi estas la ununura aĵo: mi ne povas fari malbonon al vi ne vundante min mem.**

La ne-perforto kontraŭstaras la praktikatan justecon kiu dum jarcentoj regis la historion ek de la "egal-repuno", okulon pro okulo kaj denton pro dento. **Okulon pro okulo... kaj la mondo iĝas blinda. Ne estas vojo kondukanta al la paco krom la paco, la inteligenteco, la vero. Necesas konverti la kontraŭulon malfermi la orelojn al la voĉo de la prudento.**

Oni povas resumi la vivon kaj ferojn de Gandhi per ĉi tiu lia poezio:

Malkovru la amon

*Prenu rideton
donu ĝin al tiu, kiu neniam ĝin havis.
Prenu sunradion
flugigu ĝin tien, kie regas la nokto.
Malkovru fonton
banigu tiun, kiu vivas en la koto.
Prenu larmon
apogu ĝin sur la vizaĝon de tiu, kiu neniam ploris.
Prenu kuraĝon
metu ĝin en la animon de tiu, kiu ne kapablas lukti.
Malkovru la vivon
rakontu ĝin al tiu, kiu ne kapablas ĝin kompreni.
Prenu la esperon
kaj vivu en ĝia lumo.
Prenu la bonecon
donu ĝin al tiu, kiu ne kapablas doni
Malkovru la amon
kaj konigu ĝin al la mondo.*



Informoj el la lokaj grupoj

Milano:

Dopo la pausa estiva, con il mese di settembre riprende in Milano la celebrazione mensile della Santa Messa in

esperanto presso la chiesa di San Tomaso ogni terzo sabato del mese alle ore 16,45. La chiesa si trova in via Broletto angolo via San Tomaso ed è facilmente raggiungibile a piedi da piazza del Duomo. Dal nostro sito: <http://www.ueci.it/grupoj/Milano/> è possibile scaricare in anticipo il testo della Messa e dell'omelia.

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2012

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	21,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	10,50 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	10,50 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	42,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	42,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	84,00 €
Solo abbonamento a Katolika Sento (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a Espero Katolika (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.* codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F. Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E. Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F. Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento vanno spedite al presidente UECl.

GIOVANI CONCORRETE

L'UECI dispone ancora di n° 3 premi da 258,23 € ciascuno da assegnare a giovani di età compresa tra i 18 e 30 anni, iscritti all'UECI che conseguano il diploma di esperanto di terzo grado. I premi saranno erogati quale contributo per la partecipazione a un congresso dell'UECI o dell'IKUE. Gli interessati si rivolgano al presidente UECl.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it - sendis Tiziana Fossati)

Profesioj

Kirurgo, arkitekto kaj advokato diskutas pri la malnoveco de siaj profesioj.

La kirurgo diras:

- Certe, la plej malnova estas la mia. La Biblio, diras, ke la Eternulo faris la virinon el la ripo de Adamo, do Li faris kirurgian intervenon.

La arkitekto replikas

- Sed antaŭe Li ordigis la unuan ĥaoston, kaj tio estas certe arkitektura interveno, do, nenio estante antaŭ tiu ĥaoso, mia profesio estas certe la plej malnova.

La advokato fine demandas:

- Sed diru: laŭ vi, kiu kreis tiun ĥaoston?

Ŝu-paro

- Ĉu vi ne rimarkis, ke vi surmetis unu ŝuon nigran kaj la alian brunan? Iru hejmen por ŝanĝi ilin!

- Estas senutile: ankaŭ la pa-

ro, kiun mi havas hejme, estas kunmeto de unu ŝuo nigra kaj unu bruna.

Referaĵoj

La pilotoj de aviadila firmao, fine de ĉiu flugado devas plenigi formularon, en kiu ili notas la problemojn renkontitajn. Poste la inĝenieroj de la riparejo prinotas sub ĉiu rimarko siajn solvojn.

Jen ekzemploj de problemoj [P] kaj rilataj solvoj [S]:

[P] La pneŭmatiko interna maldekstra estas preskaŭ anstataŭenda.

[S] Pneŭmatiko preskaŭ anstataŭita.

[P] Aŭtomata alteriĝo iom tro malglata

[S] Aŭtomata alteriĝo ne instalita en la aviadilo

[P] Estas io malstreĉiĝinta en la kajuto

[S] Streĉigita io en la kajuto

[P] Aŭtomata piloto en modo "plutenu la altitudon" igas malsupreniron je 150 futoj minute.

[S] Neeblas reprodukti la fenomenon surtere.

[P] Signoj de likado ĉe la dekstra ĉareto.

[S] Signoj forigitaj.

[P] Laŭteco de DME nekred-eble alta.

[S] Laŭteco de DME setita je pli kredebla nivelo.

[P] IFF ne aktiva.

[S] IFF neniam aktiva se en ekskludita pozicio.

[P] Suspektita kreviĝo en la vitro.

[S] Mi suspektas ke vi pravas.

[P] Mankas la motoro numero tri.

[S] Post mallonga serĉo, motoro trovita sub la dekstra alo.

[P] La aviadilo kondukta strange.

[S] Aviadilo admonita, ke li konduktu serioze.

[P] Muso en kajuto.

[S] Enmetita kato en kajuto.

Lingvolernado

Paro de geedzoj eniras lingvolernejon:

- Ĉu ni povus lerni la ĉinan lingvon ĉi tie?

- Jes. Kial vi volas lerni ĝuste la ĉinan?

- Ni adoptis ĉinan infaninon, eble post unu jaro ŝi jam komencos paroli, kaj ni volas kompreni, kion ŝi diras.